

Karaj junaj amikoj!

Unue estu dirite, ke mi admiras ĉiun junan homon, kiu en tiu ĉi preskaŭ jam komplete usonigita mondo – mi ŝatas Usonon esti usona, sed Germanion germana, Francion franca, Aŭstrion aŭstra, Slovenion slovena ktp. – sub la regado de *Basic English*, ne la angla de Shakespeare aŭ de *King James Bible*, kiu fakte fariĝis la tutmonda lingvo (tamen ne la internacia) decidis dediĉi sian tempon kaj energion por la afero, kiun la mondo de ĉiuaspekta potenco priridas kaj principe malakceptas. Tio faras vin originalaj, kuraĝaj, justece kaj racie interesitaj kaj perspektivvidaj. Sed, kial difekti unu el tiuj belaj trajtoj jam tujdekomence per epigona parafrizado kaj parodiado el la enkonduka alineo al la *Manifesto de komunistoj* fare de Karlo Marx kaj Frederiko Engels? Mi kredas, ke junaj homoj kiel vi havas en sia menso kaj talentaro sufiĉan kapaciton por elpaŝi en la publikan mondon originale kaj ne per la jam delonge trivita kaj morale tiel katastrofa materialo, kian tiu ĉi teksto el la unua duono de la 19-a jarcento prezentas.

Tamen per la cetera bona tendenco esti originala oni ne devas troigi. Tiel ekzemple la troigado esti je ĉiu prezo kaj kontraŭ ĉia racio „originala” trovis sian bildon ankaŭ en niaj lingvoj per la sintagmo „ne inventi denove la radon”. Bedaŭrinde ankaŭ en la historio de Esperanto – se iu socia fenomeno kontinue daŭras pli ol 100 jarojn, oni jam prave povas paroli pri historio – fantomas provoj, inventi radon ĉu gramatike, ĉu leksike, ĉu ortografie, ĉu stiluze. Fariĝis preskaŭ parto de esperantpopola folkloro, tuj post la duonsukcese farita ekzameno A proponi certajn lingvajn reformojn en la verko de d-ro Zamenhof. Tian nove inventitan „radon” mi trovas ankaŭ en via prezento de „riismo” en la senco de la genra ideologio, kiu minacas la racion kaj spiriton ne nur de la lingvo internacia, sed ankaŭ de niaj naciaj lingvoj kaj tiel ankaŭ de la popola menso, kiu averaĝe ne posedas sufiĉan scion kaj instruitecon por povi demaski la stultaĵojn, kaŝitaj sub la ŝajnhaŭto de la justeco, koncernanta rilatojn inter ambaŭ seksoj.

Nun mi devas reveni al la klasikulo de la komunisma ideologio Karlo Marx, kies poezian parollerton vi uzis en via enkonduka alineo. Spite tion, ke mi lian ideologion, same kiel la ideologion de la origine – marksisma – germana nazia ideologo d-ro Goebbels malakceptas, ĉar en sia esenco en si krimaj, mi ĉe Marx tamen agnoskas certan intelektan kvaliton, kian oni ĉe nazioj ne povas trovi. Kaj se oni imagus reveni en la jaron 1848 kaj proponi al Marx la solvon de la justeca problemo inter ambaŭ seksoj per lingvaj reformoj en la senco de la moderna genro-ideologio, mi aŭdas lian larĝan rikanridon kaj liajn ne tro decajn insultvortojn, kiajn li kutime uzis ne nur por la „reakciaj” politikistoj de sia tempo, antaŭ kiuj li devis kelkfoje fuĝi, sed eĉ pli por siaj socialismaj kamaradoj, kiuj kompreneble ne povis sekvi lian intelekton kaj provokis ĉe li ne nur ironiajn, sed sarkasmajn reagojn. Solvi la problemaron inter viro kaj virino per „revolucio” aŭ eĉ nur „reformo” en gramatiko kaj leksiko, estus por Marx kaj restas por ni nuntempe simple tro malmultekosta provo reglementi la interhomajn rilatojn, speciale tiujn, kondiĉitaj de onia seksa diferenco, absurda afero. Se mi utiligas la pensajn kategoriojn de Markso, mi povus diri: Same, kiel la sklavo ne ĉesas esti sklavo, se oni lin ĉu revolucie, ĉu reforme, nomas servutulo, laboristo, dungito... ankaŭ virino ne ĉesas esti tiel ofte ekspluatata,

maldece kaj brutale traktata, antaŭ la leĝo ne same valida, se oni anstataŭ per *ŝi* alparolas ŝin same kiel viron, „neŭtrale” per *ri*!

Kaj nun pri la „invento de rado” en tiu ĉi ideo... La genre neŭtrala formo en Esperanto jam tujdekomence ekzistas kaj por beboj same kiel por animaloj regule uziĝas. Temas pri la tria persono *ĝi*, kiu staras por objektoj, fenomenoj, vivaj estaĵoj kaj homaj beboj. *Ĝi* ne enhavas indikon pri la seksa aparteno, do *ĝi* estas tute sekse neŭtrala; la adeptoj de la genra ideologio povas tion uzi sen interveno en la Fundamenton. Apud la sekse neŭtrala pronomo *ĝi* Esperanto hava aldonan same neŭtalan formon *oni* en la senco de la germana „man”, kiun oni povas uzi, se temas pri nedifinitaj personoj – kaj la moderaj genristoj-riistoj pliparte zorgiĝas ĝuste pri tia kazo.

Mi supozas, ke vi kontraŭstaros la uzon de *ĝi* por indiki seksan neŭtralecon per argumento, ke la plenkreska homo tamen nek estas plu bebo nek besto aŭ planto aŭ morta objekto. Skize dirite, subite vi forgesas pri la plej alta leĝo de la genrismo-riismo: la neŭtraleco. Se la neŭtraleco estas *ultima ratio*, la plej alta saĝo de via movado, bonvolu do esti per tio konsekvenca. Ne estu partieca inter bebo kaj oldulo, sub la principo de absoluta neŭtraleco ili ambaŭ estas ĉiu por si kaj ambaŭ inter si neŭtralaj objektoj! Ne estu partieca inter morta objekto, planto, besto kaj homo, ja sub la principo de absoluta neŭtraleco ili ĉiu/ĉio por si estas la samo, kaj inter si ili ĉiuj estas la samo. Do ankaŭ en la tabelo de korelativoj oni devus inventi genrolingvan „radon” por ne esti partieca ĉu objekte, ĉu animale, ĉu home. Vi devas prikonsideri, ke jam la nocio „homo” en la kodo de via ideologio estas atako kontraŭ la principo de neŭtraleco, kiel *ĝi* estas atako kontraŭ la principo de la vulgardarvineca evoluciismo, en kiu ankaŭ la genra ideologio radikas. En la natura mondo nenie troviĝas distingo inter la objektoj, ĉar laŭ la materiisma mondpercepto la vivo ne estas io principe speciala, sed nur alia formo de la „memorganiziĝo de la materio”, kiel sin esprimis Frederiko Engels kaj la samon ripetis Lenin kaj ĉiuj epigonoj post li. Ke la homo esence estas io alia ol la eĉ tiom inteligenta besto, tion oni ne povas scii el la naturo, tion oni eksciis ekskluzive el la vorto de Dio, se oni en ĝin kredas esti aŭtenta parolo de vere viva Dio.

Kompreneble ankaŭ ĉiuj materiistoj kaj evoluciistoj al la homo daŭre diras „homo”, sed ne surbaze de la nature donitaj argumentoj, sed pro sia malkonsekventeco, kia tiun ĉi mondpercepton tiel forte karakterizas. Kaj niaj lingvoj respegulas la distigon inter la homa raso kaj aliaj vivaj estaĵoj kaj inter la viro kaj la virino, inter la patro kaj la patrino, inter la filo kaj la filino, laŭ la sama transcenda informo, laŭ kiu oni la homon diferencas disde la simio. Tial Karl Julius Weber, sprita germana verkisto kaj sentencaŭtoro, povis ironii: „Unmenschen gibt es, aber keine Untiere” (Troviĝas malhomoj, sed ne troviĝas malbestoj).

Ĉu Esperanto vere estas neŭtrala lingvo? Jes, sed nur en kelkaj aspektoj, neniel absolute.

Esperanto antaŭ ĉio estas kaj devas esti neŭtrala, por harmonii kun la senco de sia estiĝo kaj misio, inter la gentoj, nacioj kaj ŝtatoj. Tio ĉi estas la origina, zamenhofeska neŭtraleco de la Lingvo Internacia, kiel Esperanto origine nomiĝis. Sed neniu esperantisto, komence kun Zamenhof, venis al ideo malpermesi nomi la gentojn, la naciojn kaj la ŝtatojn por esti tiel strikte neŭtrala, kio farus la analogion kun la postulo de la genro-riismo, kiu volas forigi la indikojn pri io tiel reala, kiel la seksa diferenco estas. Neŭtraleco ne signifas prisilenti la realon kaj ĝiajn diferencojn, sed signifas samrajte, do juste trakti la portantojn de tiaj diferencoj, kiel sekso, aĝo,

nacieco, religio, mondpercepto ktp. Ĉu Esperanto estas kaj pravas esti neŭtrala politike? En certa senco jes, en certa senco tamen ne! Inter faŝismo, nacionalsocialismo kaj komunismo ekzemple oni kiel esperantisto devas esti neŭtrala, ja ĉiuj-ĉi politikaj sistemoj estas laŭ sia ideologio kaj konduto krimaj, do oni ne atribuu el unu el ili avantaĝon kaj al la alia malavantaĝon. Ĉu oni kiel esperantisto estu neŭtrala inter la partioj kiel la konservativa, la progresiva, la liberala, por ne nomi iliajn konkretajn nomojn? Jes, ĉar neniu el ili principe havas kriman karakteron, ĉiu el ili enhavas kelkajn bonajn kaj utilajn karakterizojn kaj programerojn, kaj samtempe ili ĉiuj havas ankaŭ siajn mankojn kaj erarojn. Ĉu la unuopa esperantisto kaj la tutmonda Esperanto-movado estu neŭtrala inter la demokratie kaj jurvalide regataj ŝtatoj, respektantaj la homan liberon kaj la saman leĝon por ĉiuj civitanoj? Jes, ĉar la diferencoj inter ili estas historiaj, kulturaj ks., sed ne ankaŭ moralaj kaj justecaj. Ĉu oni povas esti neŭtrala inter la sistemoj demokratiaj kaj totalismaj, ekzemple inter la demokratia Britio kaj totalisma Ĉinio aŭ Nordkoreio? Ne, ĉar laŭ sia valorsistemo Esperanto mem ne estas kaj ne povas esti neŭtrala. Bedaŭrinde la tutmondaj organizaĵoj de esperantistoj en tiu ĉi punkto multe eraris kaj faris putrajn kompromisojn kun la tiranoj de diversaj specoj, kaj tion kelkaj el ili faras ĝis nuna tempo, makulante tiel Esperanton en la senco de ĝia morala karakterizo.

Kaj jen la decida demando: Ĉu Esperanto estu neŭtrala inter la religioj, ekzemple inter la kristanaj komunumoj unuflanke kaj la islamaj aliflanke? En la senco respekti la liberon de la homa konscienco kaj libero kredi transcende laŭ sia bontrovo – certe jes. Sed en la senco de propra valorsistemo tamen ne. Esperanto mem ne naskiĝis hazarde kaj ekster certa religia fono. La religia fono de Esperanto estas la juda religio, la instruo de Torao. Ĉar la kristana religio plene agnoskas la librojn ek de la 1-a libro de Moseo (Genezo) ĝis la lasta profeto Malaĥio la konsista parto de la Biblio, do la vera vorto de Dio, ankaŭ la kristana instruo estas la fono de Esperanto. Tial nenia hazardo, se Esperanto naskiĝis el juda familio kaj persono, sed el la geo-religia kadro de la kristana kred- kaj valorsistemo. Ĉi tie ne temas pri internaj diferencoj, ĉu judo ortodoksa kaj strikta aŭ judo liberala, kiel d-ro Zamenhof estis, la esenca mentalo kaj kredo estas la sama. Same ne estas decide, ĉu kristano ortodoksa, protestanta aŭ katolika. La diferencon faras nur la aparta kategorio de la nove naskitaj kristanoj, kredantaj kaj vivantaj sur la biblia fundamento, kiuj faras en la kristana religia mondo minoritaton. Sed ili tamen havas la saman Biblion kiel ĉiuj aliaj kristanoj, ili nur prenas ĝin serioze kaj konsekvence por sia vivogvidilo kaj absoluta normo. Tial ankaŭ ne estas mirinde, se ĝis nun Esperanto kiel socia fenomeno sin instalas tie, kie plimultas la kristana aŭ de la kristana instruo sufiĉe forte influita loĝantaro. En la landoj de islamo ekzemple Esperanto krom kelkaj esceptoj ne havas ŝancojn. Ke Esperanto relative bone instaliĝis en Ĉinio kaj Vjetnamo, rezultiĝas el la fakto, ke sur la kruda mondpercepta kaj religia mapo de la mondo la komunismo estas subsistemo en la kadro de la jud-kristana kredo. Marx estis Judo! La plej grava katolika filozofo, franco Jacques Maritain diris, ke la marksismo estas la lasta herezo de la kristanismo. Kaj ĉiu herezo portas en si la semojn de la sistemo, kontraŭ kiu ĝi herezas. La rusa filozofo Nikolao Berdjajev en sia libro *Vero kaj malvero de l' komunismo* (troviĝas ankaŭ en la germana kaj esperanta tradukoj) tion brile dokumentis.

Se tamen oni insistas ĉe la ĝenerala kaj absoluta neŭtraleco, do ankaŭ neŭtralo inter la morala bono kaj malbono, inter la jura kaj religia justo kaj maljusto, tiam oni nepre perdas argumenton por la internacie neŭtrala lingvo, ja ankaŭ inter la angla kaj ekzemple la platdiĉa lingvoj validus neŭtrala prijuĝo kaj ne estus motivo malakcepti la anglan kiel *lingua franca* pro tio, ke temas pri la lingvo de certa nacio. En la senco de absoluta neŭtralismo ankaŭ diferenco inter juste kaj maljuste ne troviĝas, kial do la plej forta ne prezentu sin ankaŭ kiel la plej valora, kiel tio estas en la naturo? La specialan neŭtralecin de Esperanto kiel lingvo oni povas argumenti nur, se oni ne estas neŭtrala inter bono kaj malbono, inter justo kaj maljusto. Kaj tian neneŭtralecon instruas specife la jud-kristana religio.

Mi deziras al vi, Timo, Jarno kaj Annika, insiston en la partieco flanke de la bono kaj justo kaj neŭtralecon flanke de la komunika instrumento tion mesaĝi kaj praktiki – kaj salutas bondezire en la jaro 2015 –

Vinko Ošlak, Klagenfurt / Celovec / Klaŭdiforumo, Aŭstrio